# Bulteno

## de Esperantista Klubo en Prago

Časopis Klubu esperantistů v Praze | N-ro 2/2025 (234) | 29. 10. 2025

# Universala kongreso en Brno per niaj okuloj




Fine de julio kaj komence de aŭgusto 2025 okazis en Brno la 110-a Universala Kongreso de Esperanto, la tria en la historio en nia teritorio. Kiel travivis la kongreson kaj kiel ĝuis ĝin la gesamideanoj de nia praga rondo? Kiel ili kontribuis al ĝi? Vi trovos respondojn en ĉi tiu numero de Bulteno, kiu estas plejparte dediĉita al tiu eksterordinara evento.

**EL LA ENHAVO**

Rememoro pri Jiří Patera ............................ 3
Ora ĉiutaga vojo .......................................... 4
E-mental' en Londono ................................ 5
UK 2025 – Enketo de la Bulteno ................. 8
UK 2025 – El la salutleteroj ....................... 12
UK 2025 – Kongresa rezolucio ................... 17
Ĉeĥaj spuroj en Afriko ............................... 20

**O časopisu**

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7
Vychází třikrát ročně
Kontakt: t.brichacek@seznam.cz
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: Pavol Petrík

# AKTUALAĴOJ

## Okazintaĵoj ekde julio

**20/07/2025** – mallonga intervjuo kun Tomáš Břicháček en la Ĉeĥa Televido (ČT24) rilate al la UK en Brno

**26/07–02/08/2025** – Universala Kongreso de Esperanto en Brno kun multnombra partopreno kaj grava kontribuo de pragaj esperantistoj

**18/08/2025** – interreta prelego de Tomáš Břicháček pri Jiří Patera

**25/09/2025** – prelego de Josef Kalčík pri la Merkatika funelo *(klubejo)*

**09/10/2025** – prezentado de Margit Turková pri ŝiaj hobioj *(klubejo)*

**23/10/2025** – prelego de Petr Chrdle okaze de la 100-a naskiĝtago de Martin Stuppnig *(klubejo)*

---

## Vlasta Pištíková proklamita honora membrino de ĈEA



Nepretervidebla kaj neanstataŭigebla aktivulino de la Esperanta vivo en Prago, estraranino de la praga klubo kaj „diktatorino“ de E-mental’ **Vlasta Pištíková** estis dum la konferenco en Havířov en oktobro 2025 proklamita honora membrino de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Ni elkore gratulas!

**Leonarda Chaloupková pri Vlasta:**
Vlasta Pištíková, anino de E-klubo en Prago, laboras kiel akceptistino de la Ĉeĥa kamero de rajtigitaj inĝenieroj kaj teknikistoj (Česká komora autorizovaných inženýrů a techniků) en Prago. Krom sia laborokupo ŝi trovas multe da tempo por Esperanta grupo E-mental’. En la jaro 1998 ŝi kunfondis la societon kaj pli poste ŝi iĝis ĝia gvidantino. La societo arigas multajn esperantistojn, eĉ eksterlandajn. La programo de E-mental’ estas vere bunta – de vizito de vinkelo en Velké Pavlovice, virtuala kuro por Paraple, praga aranĝo Helpu helpi, ĝis komunaj eksterlandaj vojaĝoj – al Germanio, Aŭstrio, Britio kaj plej ofte al Italio. Tre sukcesa estis ĉi jara aranĝo Ĝuu EsperantoN, okazinta en diversaj urboj.

Per siaj aranĝoj Vlasta kun la geamikoj de E-mental' prezentas al eventualaj rigardantoj Esperanton kiel amuzan, interesan lingvon.
Dum la UKo en Brno Vlasta perfekte organizis laboron de helpantoj, do ankaŭ dank' al ŝi la kongersaj tagoj pasis tre bone.
Pro sia sindona agado en Esperantujo, engaĝigo de precipe junaj esperantistoj en E-mental', pro nefinantaj bonaj ideoj, ŝi plene meritas la aprezon de honora membro de ĈEA.
Ni gratulas!

---

## Rememoro pri Jiří Patera



Ĉi-jare ni rememoras la 90-an datrevenon de la naskiĝo kaj la 10-an datrevenon de la forpaso de Jiří Patera (1935–2015), honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.
Samideano Patera estis longtempa meritplena aktivulo de nia klubo. En la jaroj 1994–2003 kaj 2010–2012 li estis ĝia prezidanto. Li ankaŭ fervore servis kiel redaktoro de la Bulteno.
La 18-an de aŭgusto, do precize je la tago de la neatingita 90-a naskiĝtago de Jiří Patera ni organizis interretan prelegon „Jiří Patera – vivo kaj verko de elstara praga esperantisto“. Kvankam estis ferioj, la ĉeesto estis kontentiga. La prelego estis registrita kaj troveblas nun en nia kluba jutuba kanalo:
https://www.youtube.com/watch?v=8h_bGPCM1P4.

---

## Reta Babilado




Umíte základy esperanta, ale chybí vám možnost mluvit? Navštivte večerní Reta Babilado – pro ty, kteří už mají za sebou nějaký kurz, prošli nějakou učebnici, ale nemají, s kým si v esperantu popovídat.
Každé úterý během školního roku v 19 h. na adrese https://meet.jit.si/ces-reta-babilado.

# Ora ĉiutaga vojo – ekspozicio de Běla Sýkorová

Ekde la 10-a ĝis la 31-a de oktobro 2025 okazas en la Muzeo de Oro en Nový Knín ekspozicio de pentraĵoj de nia membrino, samideanino Běla Sýkorová. La ekspozicio nomiĝas Ora ĉiutaga vojo.



Sube ni prezentas tradukon de fragmentoj de la akompananta teksto, kiun la organizantoj preparis por la ekspozicio:

*La Muzeo de Oro en Nový Knín preparas ekspozicion de pentraĵoj de la artistino Běla Sýkorová, kies arta manskribo distingiĝas per precizeco de linioj kaj zorga konstruo de komponoj, sed samtempe estas trapenetrata de profunda emocieco kaj intuicia serĉado de harmonio. La pentraĵoj funkcias kiel vidaj taglibroj – ili kaptas humorojn, rememorojn kaj subtilajn nuancojn de la interna mondo. Por ili estas karakteriza riĉa koloreco, ornamenteco kaj la kapablo enkonduki la spektanton en intiman, tamen universale kompreneblan spacon.*
*La ekspozicio en la Muzeo de Oro en Nový Knín ofertas unikan eblon konatiĝi kun la transversaĵo de ŝia ĝisnuna kreado kaj rigardi en mondon, kie precizeco renkontas imagon, kaj kie koloroj rakontas sen vortoj.*

*Běla Sýkorová (*1957, Prago) estas ĉeĥa pentristino, kies vivo kaj kreado estas ligitaj al persona percepto de la mondo. Ŝi vivas kun diagnozo de aŭtismo, kiu donas al ŝi specialan sentemon – la kapablon koncentriĝi pri detaloj, labori kun kolora simbolismo kaj konstrui ritmon de la bilda surfaco en maniero, kiu superas konvencian perceptadon. Ŝi studis ĉe la Altlernejo pri Ekonomiko kaj la Universitato de Kembriĝo, kaj regas aktive kvar lingvojn. Ŝi unuafoje kontaktis pentron en 1979 dum feriado en Ĉeĥa Paradizo, kie ŝin ĉarmis la pejzaĝo. Dum pli longa periodo ŝi fariĝis ĉefe pejzaĝistino kaj miniaturistino. Inter 1982–1984 ŝi studis ĉe la Popola Konservatorio de la Mezbohemia Regiono. En 1985 ŝi*

*ricevis sian unuan mendoportreton, kaj dum la sekvaj du jaroj ŝi okupiĝis precipe pri portretado. Poste ŝi denove turnis sin al pejzaĝpentraĵo, ĉi-foje per la akvarela tekniko. Inter 2000–2020 ŝi ĉeestis la privatan pentro-lernejon de la akademia pentristino Věra Šteflová. Samtempe, ekde la jaro 2000, ŝi definitive trovis sin en olepentraĵo, al kiu ŝi restas fidela ĝis hodiaŭ. Ŝi dediĉas sin al pentro pli ol duonjarcenton kaj priskribas sin mem kiel memlerninton. Granda inspiro por ŝi estis Zdenka Braunerová kun siaj ilustraĵoj.*
*Běla Sýkorová estas membrino de la Asocio de Artistoj de Ĉeĥio kaj regule partoprenas en ekspoziciaj projektoj. Ŝi prezentis siajn verkojn ĉe solaj kaj kolektivaj ekspozicioj en diversaj regionoj de Ĉeĥio.*

*www.muzeum-pribram.cz*

Se vi ne povis partopreni la eventon persone, ni preparis por vi mallongan filmeton en nia jutuba kanalo, kie videblas ĉiuj eksponitaj bildoj: https://www.youtube.com/watch?v=_btDrZiHk3c.

---

## E-mental' en Londono

Vlasta Pištíková

Fine de septembro membroj de la esperantista klubo E-mental' forflugis al la brita ĉefurbo. La celo de la vojaĝo ne estis nur konatiĝi kun Londono, sed ankaŭ renkontiĝi kun lokaj esperantistoj. Kaj la spertoj estis abundaj.
Post la alveno al la londona flughaveno ili veturis per trajno al la junulargastejo, kie ili havis rezervitajn ĉambrojn. Jam survoje aliĝis al la grupo Martin – slovako, kiu jam de multaj jaroj loĝas en Londono kaj volonte fariĝis ilia akompananto. La unuan vesperon li kuniris kun ili al nemalproksima manĝejo, kie ili povis gustumi ne nur la klasikan britan pladon „fish and chips" – fritita fiŝo kun terpomfritoj, kiu tre bongustis al ĉiuj.
Matene je la oka horo ili iris al simpla manĝejo por realigi sian deziron – gustumi veran anglan matenmanĝon.
Sur la tablo aperis fazeoloj, kolbasoj, ovoj kaj rostita pano. Iuj elektis eĉ pli abundan varianton kun terpomaj trianguletoj kaj tiel nomataj nigra kaj blanka pudingo. Ĉiuj atendis, ke la pudingo estos dolĉaĵo, sed alvenis io simila al ĉeĥaj tripo- kaj sangokolbaso. „Estis surprizo, sed tre bongusta," ĉiuj konsentis. La manĝon kompletigis kafo aŭ teo kun lakto – ĝuste tiel, kiel la angloj trinkas ĝin.

Je la deka horo ili devis renkontiĝi kun lokaj esperantistoj. Pro metroa interrompo ili alvenis iom malfrue, tamen Anthony kaj Matt ilin varme bonvenigis.
Ĉiuj kune ekiris piede tra la urbo. Ili vidis la Katedralon de sankta Paŭlo, la Monumenton, la Bukinghaman Palacon, la faman Trafalgar-placon…




La promenado daŭris plurajn horojn kaj finiĝis ĉe la Tower Bridge. Ili estis bonŝancaj kaj povis vidi kiel la ponto malfermiĝis, por ke venanta ŝipo povu traveturi sub ĝi.
La tagon ili finis per vespermanĝo en antaŭe mendita restoracio, kie aliĝis al ili pluaj londonaj esperantistoj. Vigla konversacio ĉe bona manĝo kaj trinkaĵoj daŭris preskaŭ ĝis la dek unua horo.
La sekvan matenon E-mentalanoj ankoraŭfoje ĝuis lastan anglan matenmanĝon kaj poste ekveturis al la flughaveno. Ĉiuj forveturis kun la sento, ke Londono estas tre ĉarma urbo ne nur pro sia etoso, sed ankaŭ pro la afableco de la homoj, kiujn ili renkontis. „Estis mirinda vizito, kaj ni certe volas reveni,“ konsentis ĉiuj el la grupo.
E-mentalanoj ŝatus esprimi sian dankon al ĉiuj, kiuj helpis organizi la viziton, al ĉiuj pro ilia varma akcepto kaj gvidado tra Londono. La vojaĝo fariĝis vere memorinda danke al ilia ĝentileco kaj amikeco.

*www.e-mental.cz*

# UNIVERSALA KONGRESO EN BRNO

## „Praganoj“ en Brno



Du komunaj fotoj de niaj membroj kaj favorantoj dum la UK-o. (Pro la rapida ritmo kaj granda okupiteco estis malfacile kunvenigi ĉiujn samtempe.)



# Enketo de la Bulteno

*Ni demandis la pragajn kaj al ni proksimajn partoprenintojn: Kiaj estas viaj impresoj aŭ viaj plej interesaj travivaĵoj de la UK-o en Brno?*

Kion mi perdis, kion mi trovis?
Ordinare estas tiel, ke unue oni ion trovas kaj poste ion perdas. Ĉe mi estas same, sed dum la kongreso estis iom alie:
Mi PERDIS unu kaj duonon de la korpo-pezo. Kiel anino de preparkomitato mi devis prizorgi aranĝon de kultura programo. Ĝi estis afero de antaŭtagmezo ĝis vespero, eĉ nokto – kelkfoje ne estis tempo aŭ ebleco por normala tag- aŭ vespermanĝo. Krome okazis multaj transkuroj tien kaj reen. Por organizo de la kulturprogramo staris super mi simpatia franca fraŭlino Linda. Ankaŭ ŝi verŝajne perdis kelkan kilogramon. Sed mi devas konstati, ke la kultura programo plaĉis al la spektantoj.
Mi PERDIS miajn ŝatatajn rozkolorajn okulvitrojn kun „diamantoj", irante tra urbo por pritrakti oficajn aferojn.
Oni (ne mi) PERDIS fluton de itala kantistino Monika el arta duo Kajto. Post prezentaĵo de Kajto dum solena fermo de la kongreso Monika (laŭ ŝiaj vortoj) metis la fluton sur proksiman tablon de registaro kaj forgesis ĝin tie. Pli poste, kiam ŝi konstatis malaperon de la fluto, la salono Zamenhof estis jam fermita, ne alirebla. Post kelka tempo Monika interrete turniĝis al mi kun peto, ĉu mi povu helpi al ŝi trovi la fluton. Spite de mia klopodo, mi ne sukcesis
Ĉu iu el vi scias, kie la fluto povas esti? Vana demando!
Kaj kion mi TROVIS? Mi trovis konvinkiĝon, ke sindonaj homoj – komprenu anoj de la preparkomitato, helpantoj kaj ĉiuj, kiuj preparis la kongreson – povas fari tiel eminentan, sukcesan laboron, ke la kongreso finfine estis MOJOSA!

**Leonarda Chaloupková**

Min tre ĝojigis la vortoj de Vlastimil Kočvara, la antaŭa prezidanto de ĈEA, kiu organizadon de la kongreso taksis tre pozitive. Li antaŭ kongreso maltrankviliĝis, ke ni eble povus perdi la tre bonan reputacion, kiun ni akiris dum la organizado de kongreso en la jaro 1996. Entuziasmo de Vlastimil Kočvara dum la kongreso montris, ke ni ne nur ne perdis ĝin, sed male, ni plifortigis ĝin.

**Jiří Caletka**

Za sebe mohu říci, že si pořadatelé, jejich práci velmi oceňuji, dali velkou práci s uspořádáním mnoha zajímavých přednášek a výletů. Byl jsem registrovaným účastníkem, ale též dobrovolníkem pod velením Vlasty P. Byl to můj 1. UK, protože esperanto hlavně využívám na svých cestách (velmi se mi osvědčil tento logický a melodický Zamenhofův jazyk v Japonsku a Jižní Koreji). (Přiznávám, že si dost pomáhám angličtinou, kterou ovládám lépe než esperanto.) Zábavné večery byly úžasné. Na UK v Brně jsem potkal dost zajímavých lidí, které spojovala kromě esperanta touha po míru, nejen v srdcích, ale ve světě.

**Jiří Blažek**

Mi partoprenis UKo-n kiel organizanto – mi estis membro de loka kongresa komitato (LKK) kaj mi respondecis pri sociaj retoj. El la organiza vidpunkto mi taksas la kongreson en Brno kiel eminentan sukceson – mi parolis kun diversaj homoj dum kongreso kaj mi aŭdis neniun plendon nek pri organiza flanko de la kongreso nek pri io alia. Okazis nenia granda fuŝo. Mi ege fieras ne nur pri la eminenta laboro de membroj de LKK, sed ankaŭ pri ĉiuj volontuloj. Vlasta Pištíková kunorganizis pli ol 60 volontuloj – ili grave subtenis kaj kontribuis al la sukceso de la tuta kongreso en Brno. Sen la helpo de volontuloj, sen kunlaboro de LKK kaj sen kunlaboro de Kongresa Fako (Peter Baláž, Dorota Rodzianko, Sona Zaretskaia) la kongreso certe ne estus tiel sukcesa, kiel ĝi estis. Do koran dankon al vi ĉiuj, kiuj helpis antaŭ/dum/post la kongreso. Mi certas, ke la 110-a kongreso en Brno estos rememorata kiel unu el la plej sukcesaj kongresoj.

**Josef Kalčík**

Mia plej interesa travivaĵo estis kunveno kaj parolado kun miaj Esperantaj amikoj el aliaj landoj, kun kiuj mi ne havas eblon ofte paroli.

**Radmila Švejcarová**

Mi aliĝis al la UK-o kiel volontulo, do mi preskaŭ ne povis partopreni aliajn programerojn de la kongreso, sed tio ne gravas, ĉar mi kalkulis pri tio. Mi ege ĝuis ĉiujn ses ekskursojn, kiujn mi povis gvidi. La kunlaboro kun la teamo de volontuloj estis eminenta. Dankon al Jana Zygal, kiu brile organizis la ekskursojn dum la UK. Kaj por mi persone la plej bela sperto estis antaŭkongreso en Prago, kiun perfekte gvidis Radmilka. Estis vere granda plezuro helpi dum la ekskursoj en mia amata urbo.

**Pavol Petrík**

Al mi la plejparto de la plej impresigaj aferoj okazis ekster la oficiala programo. Unue, ĉefe en la kafejo kaj manĝejo, renkontiĝoj kaj babiladoj kun multjaraj amikoj, kiujn mi jam multajn jarojn ne vidis; due, hazardaj renkontiĝoj en la urbo kun kongresanoj havantajn la saman celon, ekzemple kun Bernhard Tuider, ĉefo de la Esperanto-muzeo en Vieno ni hazarde renkontiĝis kaj vigle interparolis en la Romaa muzeo, kiun ni ambaŭ celis individue. Klare, mi vizitis ankaŭ plurajn interesajn prelegojn kaj kulturajn programerojn, de kiuj por mi estis tute nova, eĉ surpriza la travivaĵo partopreni la provon antaŭ la koncerto de Jolana Smyčková, Richard Haan kaj iliaj knaboj. Mi neniam antaŭe vidis la komplikan ĝustigadon de sonaparaturo: komence unuope ĉiuj muzikinstrumentoj, poste kantistoj, ĉiuj de la plej malaltaj al la plej altaj tonoj, diversaj petoj pri ripeto flanke de la sonmajstro, nur poste kanto kun muzika akompano. Sed laŭ la eĥo de la publiko tio sukcesis kaj ne nur la programo de la artistoj, sed ankaŭ la tekniko funkciis perfekte.

**Petr Chrdle**

La Universala Kongreso en Brno estis por mi vere unika, neforgesebla travivaĵo. Mi neniam antaŭe partoprenis iun UK-on, nur du Internaciajn Junularajn Kongresojn. Mi ege ĝojas kaj fieras, ke mi povis ĉeesti. Mi plene ĝuis la renkontiĝojn kun interesaj homoj, la prelegojn, la kulturan programon kaj la inaŭguron de la Arbo de Internacia Interkompreno. Kiel prezidanto de la Praga Klubo mi tre aprezas la grandegan laboremon kaj sindonemon de multaj miaj samklubanoj, kiuj aktive kontribuis al la organizado de la kongreso.

**Tomáš Břicháček**



110-a Universala Kongreso de Esperanto, Brno 2025

# Niaj programeroj

Pluraj membroj kaj favorantoj de la praga klubo preparis prelegojn aŭ aliajn kontribuaĵojn al la programo de la kongreso.

- Petr Chrdle lunde prelegis pri Petr Ginz kaj ĵaŭde diskutis pri sia libro *Mia vivo kun Esperanto*
- Josef Kalčík lunde havis prelegon pri la temo „Merkatika funelo – kio ĝi estas kaj kiel esti bona advokato de Esperanto“
- Jevhen Kovtonjuk lunde prelegis pri Vasil Eroŝenko
- Vít G. Mišurec marde parolis pri la temo „Ĉeĥa biero: koncepto, kiu konkeris la mondon“
- Vlasta Pištíková prezentis vendrede la filmon *Longulo, Larĝulo kaj Miopulo*
- Pavla Dvořáková marde prelegis pri la temo „Surspure de doktoro Zamenhof en Pollando“
- Viktor Dvořák preparis por ĉiuj kongresanoj la libron *Mia patrino* de Otokar Březina.






Vít G. Mišurec (meze) prepariĝas por sia prelego pri la ĉeĥa biero.

---

# Tri kongresaj salonoj nomitaj laŭ pragaj gravuloj

Tri kongresaj salonoj estis nomitaj laŭ eminentaj gemembroj de la praga klubo. Tio estis salonoj: Urbanová, Seemannová kaj Ginz.



# El la salutleteroj

„Esperanto estas escepta kultura fenomeno, kiu dum la preskaŭ cent kvardek jaroj de sia ekzisto efektive pruvis, ke ĝi estas utila komunikilo por ĉiuj nacioj de la mondo. Reciproka konatiĝo kun kulturaj tradicioj kaj historio, samkiel interhoma interkompreniĝo, estas ekzakte tio, kion oni hodiaŭ, en tempo de komplikaj kaj streĉitaj rilatoj en multaj mondopartoj, pleje bezonas. Mi aprezas, ke ĉi tiu bezono estas plene reflektata en la temo de la ĉi-jara kongreso: Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj. Homoj ja povas trovi komunan lingvon, kaj Esperanto, kiu transiras la limojn de lingvoj, kulturoj kaj ŝtatoj, estas de tio perfekta ekzemplo.“

**Martin Baxa**
ministro pri kulturo de la Ĉeĥa Respubliko, alta protektanto de la kongreso

„Viaj klopodoj por komprenado inter popoloj, por konstruado de pontoj inter kulturoj kaj lingvoj, portas en si profundan valoron, kiu resonas ankaŭ kun la kristana mesaĝo de paco kaj unueco. Esperanto – lingvo, kiu ne naskiĝis el deziro al superregado, sed el deziro al dialogo – estas bela simbolo de tio, ke diverseco ne devas dividi, sed povas riĉigi.“

**Mons. Jan Graubner**
ĉefepiskopo de Prago kaj primaso de Ĉeĥio

„Kiel oni parolos en la ĉielo? Laŭ la Biblio, la ĉiela Jerusalemo estas loko de kompreno kaj komuneco inter homoj kaj Dio. Sekve, la loĝantoj tie devas nepre paroli inter si per komuna komprenebla lingvo. Ĝi do estos lingvo trapenetrata de reciprokaj amo kaj respekto. Ĝuste je tia lingvo ni komencu labori jam ĉi tie sur nia patrino Tero.
Mia ŝatata brita verkisto Gilbert K. Chesterton diras, ke ‚la moderna homo estas edukita por kompreni fremdajn lingvojn kaj por nekompreni fremdulojn’. La celo de la fondinto de Esperanto estis krei lingvon facile lerneblan kaj uzeblan, kiu ne diskriminacius parolantojn el iu ajn nacio. Tio estas la unua paŝo al reciproka kompreno. La renesanca arta geniulo kaj inventisto Leonardo da Vinci estis konvinkita, ke ‚la plej nobla plezuro estas la ĝojo de kompreno’.“

**Mons. Pavel Konzbul**
episkopo de Brno

„Kiam iu demandas min, kiel karakterizi Esperanton, mi respondas, ke ĝi estas amo inter logiko, beleco kaj simpleco. Ankaŭ hobio kaj bona antaŭzorgo kontraŭ la Alzheimer-demenco.
Kaj kiam iu demandas, kiuj estas la esperantistoj, mi respondas, ke ili estas amantoj de logiko, beleco kaj simpleco, kiuj ne scias, kio estas demenco.“

**Max Kašparů**
grekkatolika pastro, psikiatro, pedagogo, esperantisto

„Esperanto, lingvo kreita kun la ideo de internacia kompreniĝo kaj kunlaboro, kiu povas esti lernita relative rapide, pruvas, ke komunikado sen baroj povas funkcii. Ja nur en Ĉeĥio parolas tiun ĉi plej disvastigitan artefaritan lingvon centoj da entuziasmuloj. Mi ĝojas, ke ĝuste Brno gastigas tian gravan eventon, kiu kontribuas al plifortigo de reciproka amikeco inter popoloj.“

**Jan Grolich**
estro de la Sudmoravia regiono

---

## Miroslav Malovec – nova honora membro de UEA

La 27-an de julio 2025 dum solena inaŭguro de la kongreso estis anoncitaj novaj honoraj membroj de UEA. Inter ili estas ankaŭ elstara ĉeĥa esperantisto Miroslav Malovec, kiu dum tiu ĉi kongreso zorgis pri kongresa kuriero (Drako de Brno), same kiel pri kongresa kuriero dum UK en Prago 1996. Ni kore gratulas al granda sukceso!

---

## Tomáš Břicháček en la Ĉeĥa Televido

La 20-an de julio 2025 Tomáš Břicháček mallongete aperis en la elsendo de ČT24, kie li estis intervjuita pri la UK en Brno. La etoso en la studio estis pozitiva kaj la reagoj estis favoraj. Al la Ĉeĥa Televido apartenas dankoj pro tio, ke ĝi donis al ni la ŝancon informi la vastan publikon pri la kongreso.



# Arbo de internacia interkompreno

La 28-an de julio estis en la botanika ĝardeno de Mendel-universitato inaŭgurita Arbo de internacia interkompreno, kiu rememorigos la 110-an UK-on. La arbo, kiu jam estis plantita en printempo, ĉar en somero ne indas fari tion, estas iom nekutima – likvidambaro storaka (Liquidambar styraciflua). Tiu arbo havas grandajn verdajn foliojn en la formo de kvinpinta stelo.

Ĝi estis nomata kiel la arbo de internacia kompreniĝo, kio estas unu el la ĉefaj celoj de la Esperanto-movado. La inaŭguron de la memortabulo faris komune la komitatano de UEA Francois Lo Jacomo (Universala Esperanto-Asocio), prezidanto de ĈEA Jiří Tomeček kaj prezidanto de la Esperanta Klubo Brno Milan Kolka.

La arbon prezentis la estro de la Botanika Ĝardeno Michal Pavlík, kies patrino estis esperantistino.

Jiří Tomeček deklamis mallongan parolon: „Mi salutas kaj bonvenigas vin en urbo, kie E-movado havas longan tradicion. Estis ĉi tie fondita unua Esperanto-klubo en tiama aŭstria imperio. Inter militoj de ĉi tie elsendadis Esperanta radiostacio Verda Stelo kun neforgesebla aktoro Karel Höger.

Kaj plue, en tiu ĉi urbo estis en la jaro 1969 fondita ĈEA. Ĝis nun la urbo ne havis propran ZEOn, objekton, kiu portas nomon ĉu de Zamenhof, ĉu de Esperanto. Per tiu ĉi arbo LIKVIDAMBARO STORAKA (ambroň západní) ni volas pagi tiun ĉi ŝuldon al la urbo kaj samtempe memorigi la unuan universalan kongreson en BRNO.“




Foto post la solena inaŭguro de la arbo

# Pri la nomo Brno kaj ĝia traduko

En aliaj lingvoj la urbo estas konata sub diferencaj nomoj: germane Brünn, latine Bruna, jide Brin, albane Bërno. Ĉar la fonetika sistemo de Esperanto ne havas silaboforman R, ne eblas el la ĉeĥa Brno krei esperantlingvajn derivaĵojn (Brna, Brnanoj). La formoj Brno-a, Brno-anoj ŝajnas mallertaj kaj pezaj. Tial de tempo al tempo aperas eksperimentoj esperantigi la nomon.
Karel Píč en la romano *Litomiŝla tombejo* uzis formon Bruno, Zdeněk Hršel kaj Jan Werner tradukis en la jaro 2007 faldfolion *Brno – ĝusta direkto* kaj en la teksto aplikis formon Brunno.
Akademianino Ruth Kevess-Cohen en sia artikolo Kial Burno? klarigas: „La akademianoj konsideris formojn kun aliaj vokaloj, ekz. Barno, Berno, Birno, Borno kaj Burno. Berno jam estas Esperanta nomo de la svisa urbo Bern, do ne taŭgas por Brno. Oni konsideris Bruno, sed ĝi estas ofta vira nomo, kaj bruno estas koloro. Burno ne havas tiajn malavantaĝojn, kaj ĝia elparolo sufiĉe similas al la nacilingva elparolo de Brno. Tial finfine la rekomendo de la Akademio estis Burno.“
Malgraŭ tio ĉeĥoj persistas ĉe la nomo Brno, ĉar Burno ne estas ilia urbo.

*El la kongresa kuriero Drako de Brno n-o 1*



Bildo de drako kun rado (du simboloj de Brno), kiu aperadis interalie en la titola paĝo de la kongresa kuriero *Drako de Brno*. La bildon kun helpo de artefarita intelekto kreis Vlasta Pištíková kaj Jan Šebetovský.

## Parolado de reprezentantino de la familio Zamenhof
Margaret Zaleski-Zamenhof

Karaj kongresanoj, organizantoj, gastigantoj, geamikoj, Kiel reprezentantino de la familio Zamenhof, mi sentas profundan honoron partopreni la 110-an Universalan Kongreson de Esperanto ĉi tie en Brno. Estas kortuŝe vidi, ke pli ol jarcenton post la unua kongreso, la ideoj de mia praavo, Ludoviko Zamenhof, daŭre vivas – ne kiel rememoro pri la pasinteco, sed kiel vivanta movado, respondeca kaj agema fronte al la defioj de nia epoko.

La temo de ĉi tiu kongreso – Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj – profunde resonas en mi. Esperanto naskiĝis el sopiro por interkompreno kaj paca kunesto. Teknologioj hodiaŭ estas modernaj iloj, per kiuj tiuj idealoj povas disvastiĝi pli vaste ol iam antaŭe.

Evidente mia praavo ne havis interreton. Li ne povis imagi inteligentan telefonon aŭ babilejojn kun homoj el la tuta mondo. Tamen li revis pri mondo, kie homoj interparolas kiel egaluloj – sen timo kaj sen malestimo. Ĉu ne estas ĝuste tio, kion teknologio hodiaŭ ebligas – kondiĉe, ke ni ĝin uzas respondece?

Mi pensas ankaŭ pri mia patro, inĝeniero, kiu konstruigis pontojn. Mi ne forgesas liajn vortojn, kiuj akompanas min ĝis hodiaŭ. Kiam mi estis eta knabino, li diris al mi: „Kiam mi konstruigas ponton, mi devas poste pasi sub ĝi. Kaj se mi malbone laboris, la ponto falos – kaj vundos min."

Per tio, li instruis al mi, ke vera respondeco ne estas nur plenumi taskon, sed konscii, ke niaj agoj havas sekvojn – kaj ke oni devas esti preta alfronti ilin.

Konstrui ponton inter homoj, ĉu pere de lingvo, ĉu pere de teknologio, postulas la saman respondecon. Se ni estas atentemaj, la ponto de fido restos firma.

Teknologioj donas al ni rimedojn: ni povas tuj paroli kun homoj tra la mondo, kundividi ideojn, kunlabori sen fizikaj baroj. Sed teknologio estas nur ilo. Ĝi ne garantias komprenon, kaj certe ne aŭtomate alportas fidon.

Male, misuzata teknologio povas nutri malkonfidojn, pligrandigi dividojn, kaj eĉ instigi konfliktojn. Sociaj retoj povas disvastigi malamon, misinformado povas manipuli homojn, kaj aŭtonomaj armiloj povas funkcii sen homa konscio. Sen etikaj gvidprincipoj, artefarita inteligenteco riskas ne nur speguli, sed ankaŭ akceli ekzistantajn maljustecojn.

Tial ni bezonas Esperanton – ne nur kiel lingvan solvon, sed kiel kulturan kaj etikan proponon. Ĝi montras, ke interkompreno eblas sen hegemonio, ke lingvo povas esti ilo de egaleco, ne de dominado.

Ni, esperantistoj, scias vivi kun malsamuloj en respekto. Kaj nun estas la momento por kunporti tiun sperton al la mondo – ankaŭ pere de teknologio.
Ni povas uzi nian lingvon en interretaj projektoj, en malfermitaj lernplatformoj, en artefarita inteligenteco. Sed ni devas esti aktivaj – pontoj ne konstruiĝas solaj.
Ni devas, kiel mia patro, atente rigardi la fundamentojn de la pontoj, kiuj konektas nin al aliaj homoj. Kaj se ni vidas fendojn – miskomprenojn, maltoleremon, malegalecon – ni devas ne ignori ilin. Ni devas labori por ripari, por plifortigi, por firmigi la fidon.
Do mi alvokas vin: ni uzu teknologion ne nur por rapideco, sed por respekto. Ni uzu Esperanton ne nur por paroli, sed por aŭskulti. Kaj ni restu konstruantoj de pontoj – ĉar la mondo bezonas pontojn. Kaj la mondo bezonas nin. El mia koro, mi dankas vin kaj deziras al vi inspirplenan kaj memorindan kongreson.



Margaret Zaleski-Zamenhof

---

## Kongresa rezolucio

Inter la 26-a de julio kaj 2-a de aŭgusto 2025 kunvenis 1132 homoj el 63 landoj en Brno, Ĉeĥio, por partopreni en la 110-a Universala Kongreso de Esperanto. Ni diskutis la temon *Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj*. Samtempe ni ilustris per nia propra agado, kiel bone la internacia lingvo Esperanto servas kiel ponto inter malsamlingvanoj el diversaj landoj kun diversaj spertoj kaj opinioj. Limiginte la traktadon de novaj teknologioj al ties komunikaj aspektoj, ni verkis raporton kaj surbaze de ĝi tiun ĉi rezolucion:

Kun ĝojo ni konstatas, ke la novaj komunikaj teknologioj ebligis signifan kreskon de la nombro de praktike atingeblaj Esperanto-parolantoj, pro kio la kono de Esperanto en konektita mondo fariĝas ĉiam pli valora por atingo de paco kaj konfido inter la popoloj;
Ni notas, ke artefarita intelekto (AI) por maŝina tradukado kaj, helpe de tio, multlingva komunikado fariĝis malmultekostaj kaj vaste uzeblaj;
Samtempe ni notas, ke la instigoj lerni fremdajn lingvojn malfortiĝas i.a. pro la uzo de AI kaj reduktiĝas lingva egaleco, kondukante al kultura provincismo;
Kun zorgo ni konstatas, ke estiĝas abundego da ciferecaj komunikiloj, per kiuj multaj homoj emas aliĝi al fontoj de informado kun samopiniaj grupoj, fortigante polusigon en la socio;
Ni atentigas, ke Esperanto plene taŭgas kiel internacia lingvo kaj jam posedas tutmondan komunumon de parolantoj, kiu kiel movado subtenas respekton kaj valorigon de fremdaj lingvoj kaj kultura diverseco;
Pro tio ni alvokas registarojn kaj la civilan socion en ĉiuj landoj:

- reveni al instruado ankaŭ de najbaraj lingvoj kaj enkonduki Esperanton kiel lernejan fakon por fortigi la senperan kontakton al najbaraj kulturoj kaj la neŭtralan alproksimiĝon al aliaj lingvoj; kaj
- labori por plifortigi la statuson de lokaj lingvoj kaj Esperanto kompare kun tiu de hegemoniaj lingvoj;

Ni konkludas, ke:

- reciproka konfido povas kontribui al harmonia, respektoplena, sekura kaj interkultura socia etoso kaj redukti la disdividajn fortojn en la socio;
- respekto por lokaj kulturoj portataj de lokaj lingvoj tiel plifirmiĝas, kaj samtempe socia kohero por paco fortiĝas;
- tiel la novaj komunikrimedoj helpos konstrui pontojn inter la popoloj, kaj la tendenco al bariloj kaj polusiĝo malfortiĝos.

---

## Solena ferma parolado de la nova prezidanto de UEA


Fernando Maia Jr.

Ni nun alvenas al la fino de la 110-a Universala Kongreso. Sed kion ni fakte fermas? Ĉiam post niaj renkontiĝoj, mi havas la impreson, ke efektive io nova malfermiĝas: malfermiĝas novaj vojoj, ampleksiĝas niaj mensoj, niaj koroj kaj niaj konscioj, novaj pontoj kreiĝas ktp.
La temo de ĉi tiu kongreso estis – Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj. Iusence niaj lingvoj, inter ili kompreneble Esperanto, estas teknologio. Kaj kiel ili efikos por pli bona homa rilato, tio dependos de nia konscio pri tio, ke ni ne estas solaj; ke ni

estas dependaj unuj de la aliaj; kaj ke por pli bona kunekzisto kaj kunlaboro ni bezonas vivi kaj agi solidare.
UEA naskiĝis el tiu ideo: ke ni ne estas individuoj izolitaj, sed ke ni bezonas unuj la aliajn, ke ni ekzistas kolektive kaj komune kaj ke pro tio, ke Esperanto estas nia lingvo, por ni ne estas limoj kaj baroj por kunlaboro, se ni ne ĉesos agadi solidare. La konscio pri tio estas mem la forto de nia espero pri pli bona mondo.
En ĉi tiu salono sidas homoj el dekoj da landoj, kun diversaj spertoj, kulturoj, aĝoj kaj perspektivoj. En nia diverseco, en nia bela diverseco, karaj, ni trovis tamen plene funkciantan komunan neŭtralan lingvon. Mi proponas, ke vi nun rigardu al tiuj, kiuj estas apud vi. Rigardu konscie. Apud vi estas homoj, samideanoj, fratoj kaj fratinoj de pli granda familio. Mi deziras, ke ni ĉiuj konsciu, ke ni ne estas solaj, ke ĉiuj ni povu fieri pri tio, kion atingis niaj antaŭuloj kaj kion nun ni antaŭenigas. Tio estas frukto de kunlaboro trans la epokoj kaj la spacoj, frukto de solidareco – sed ankaŭ frukto de kuraĝo.
Niaj antaŭuloj devis multe batali – kaj same ni devas daŭre batali. Tamen foje mi pensas, ke ni povus ĉesi paroli pri la fina venko de Esperanto. La kialo de tiu mia penso estas, ke por mi Esperanto jam venkis. Ĉiuj ni kaj tiu ĉi kongreso estas mem belega pruvo pri tio. Sed kompreneble ni deziras, ke Esperanto povu plu prosperi. Tamen pro tio ni ankaŭ bezonas batali por aliaj ŝanĝoj en la mondo… Efektive nur en mondo pli egaleca, pli justa kaj pli solidara Esperanto povos plene prosperi.
Se do ne plu paroli pri la fina venko de Esperanto, ĉar Esperanto jam venkis, ni kuraĝu komenci paroli pri: la fina venko de la Homaro. Kaj ni komprenu la potencon de Esperanto por tio, ne nur kiel lingvo, sed kiel valoro, por kontribuo al mondo kun pli da konfido kaj paco. Kun pli da amo finfine.
Estimataj, karaj miaj, mi esperas, ke vi revenos hejmen kun pli forta sento, ke vi estas parto de monda familio. Tiu konscio, ke ni ne estas solaj kaj ke ni estas dependaj unuj de la aliaj, nepre devas esti en socio, kiu agu pli kolektive kaj solidare. Mi dankas elkore pro nia renkontiĝo…
Mi esperas, ke vi revenas hejmen pli feliĉaj: tiel feliĉaj kiel mi nun estas pro miaj renkontiĝoj kun vi, pro nia UK, pro nia amikeco – pro Esperanto. Koran dankon, miaj karaj, koran dankon!

# Ĉeĥaj spuroj en Afriko (ankaŭ miaj)

Margit Turková




**Parto unua**

Mi estas certa, ke nia leganto jam scivolis vidi, kiu estas la aŭtoro tiom avida je la atento, ke li?/ŝi? arogas starigi sin mem apud famaj personuloj, pri kiuj oni volas skribi… Certe vi jam rigardis, do ni komencu pri tiuj vere la plej famaj.

Mi ne dubas, ke ĉiuj tuj pripensas – **Emil HOLUB…** Sed kiu el ni scias, ke li ne estis la unua. Por ni, eŭropanoj, Afriko komenciĝas en MAROKO. Por la ĉeĥa interesiĝanto pri Afriko, tio komenciĝas per la libro de aŭtoro, kiu vivis en la tempo de Kolumbo kaj kiun historio nomas **„Ferdinando Moravia“** (Ferdinand Moravský). Lia libro estas, ni diru, „manlibro/informlibro“ por maristoj, kiuj navigis ĉirkaŭ Maroko-marbordoj. Sed ĝi estas utila ankaŭ por zoologoj, botanikistoj kaj etnografoj de koncernaj regionoj. Ĉu li mem estis en la j. 1502 en Maroko, aŭ la informojn gajnis nur danke al sia ĉirkaŭborda navigado, ne estas sciate. La manuskripto de lia libro estas deponita en la Biblioteko en Munkeno. Nu bone – tio estas la unua dokumentita fakto „de ĉehaj spuroj al Afriko.“ Ne imagebla estas la fakto, ke iu loĝanto el tiaj malproksimoj, kie situas Afriko, Arabio, kaj, kaj, kaj… povus atingi nian landon – antaŭ pli ol mil jaroj (jes, 1000). Ĉu ni povus imagi nian ekziston, se en la j. 937 ne estus skribinta la araba (Jemen-a) komercisto Ibrahim Ibn Jakob, ke li invitis „la urbon, kies nomo estas PRAGO.“ Ĉu entute oni povas imagi, ke tie ĉi estis kultivita lando??? (Lia skribaĵo estis eldonita en la 11-a jarcento).

Poste historio mencias, ke la sultano Ibn Jakob petis la imperiestron Maxmilian pri armea helpo kontraŭ la maroka ĉefurbo (tiam Fez-o). Ĉu okazis – ne estas dokumentite…

Poste la „ekstravaganca imperiestro“ Rudolfo la Dua elsendis en Maroko-n 13-membran delegitaron. La ekspedicio daŭris 3 semajnojn, estris ĝin la


diplomato (kaj aventuristo) Antony Sherley. La celoj ne estis nur natursciencaj (ja la ĉefa intereso de la imperiestro), sed ankaŭ diplomataj. A.S. en diplomacio elstaris, li jam estis ambasadoro en Persio; onidire li estis tiom memkonscia (aroga), ke en la sultan-salonegon li eniris sur sia ĉevalo… En la ekspedicio estis ankaŭ nobeluloj, kiuj por si aĉetis famajn arabajn stalonojn (virĉevaloj por bredado).
Plua vizitanto de Maroko (de ĉeĥa provenienco) estis **Václav HOLLAR** (1607–1677), gravuristo, kiu en servoj de la angla reĝo Karolo la Dua kiel kartografisto faris multajn vedutojn de la fortikaĵo Tanger (kiun la britia reĝa dinastio ricevis herede).
„Mistera aventuristo“ **Enriquie Stanko VRÁZ.** Li vizitis Maroko-n en la jj. 1880–1883 (li estis 20-jaraĝa). 3 jarojn li vivis en Afriko kiel travestita judo.
Postrestis lin la ekscio: kiel distingi la veran kontraŭ la falsa (travestita) arabo aŭ judo:
- jena estas orde kombita – la judo havas sian hararon taŭzita
- jena havas kalojn sur la plandoj, kio sin malkovras en banejoj; araboj, kiuj surhavas sandalojn, kalojn ne havas
- jena pisas starante, arabo pisas kaŭrante
De Vráz ni ekscias, ke en Gibraltaro, sur signalturo, servis certa familio Gumbert, kies radikoj estis en nia lando. La nomo de la vojaĝisto supozigas, ke li ne estis ĉeĥo (eble bulgaro), sed lia koro estis al nia lando devota. En Papua Nova Gvineo li nomis montaron omaĝe al Bedřich Smetana. Dum sia travojaĝo de Afriko li kolektis multan etnografian materialon, sed nur io troviĝas en Prago, la urbo ne havis sufiĉe da financoj por alveturigi ĉion. Do oni povas tion vidi en Dublino, Vieno, Londono… Alte taksitaj estas liaj fotografaĵoj (pioniro de vojaĝ-fotografistoj). El Tajlando li alprenis fiŝeton – la unuan por hobio-akvarioj (*Beta Splendens).*
Li mortis en 1932 en Prago, 71-jaraĝa.
Ni daŭrigu kun „niaj spuroj en Maroko“ per jenaj informoj: la kontaktoj inter niaj landoj disvolviĝis ĝis la jaro 1906. En la merkat-amplekso ni staris sur la ŝtupo 2 (post Francio) – precipe en la eksporto de sukeraj konus-trunkoj (kiuj poste transformiĝis je kubetoj). Francio poste baldaŭ okupas la landon, en ĉiuj sferoj okazas stagnado; la progreso komenciĝas denove en la 30aj jaroj. Sian viglecon montris nialandaj entreprenistoj, la fama Baťa, kiu tie instalis 36 filiojn. La komerc-domoj Nehera kaj Rolný konstruigis fabrikojn por ŝuoj. Daŭrigis ankaŭ la „sukera merkato.“ En la jaro 1935 estis en Maroko instalita konzulejo. En la jaro 1930 veturis en Maroko-n „Papid Vinohrady“ kaj postlasis tie tiom fortan efikon, ke en la lando estis estigita la futbal-teamo „ĈEĤOJ“.

**Parto dua**
Nun eniras en la artikolon mi mem, esperante, ke nian legantaron interesos ankaŭ miaj „spuroj en Afriko“… Ankaŭ mi surpaŝis Afrikon unue en Maroko. En la j. 2004…
En la j.1983 mi partoprenis la „Afrikan simpozion“, en la urbo Holice. Allogis min la ĉefa temo: **Alberto Schweitzer – la Granda doktoro**. (tiuj simpozioj estis organizitaj ĉiun duan jaron; pri A.S. tiam parolis „la tuta mondo).“ La dua allogo estis: la evento okazis en la Memorejo de **Emil Holub** – kie la urbo Holice omaĝis sian naskiĝinton, la grandiozan vojaĝanton tra Afriko. Por honoro de organizantoj ni nomu almenaŭ la elstaran geografiston Ctibor Votrubec. El multaj prezentantoj de la evento mi elektis la homon sidantan „en la unua vico.“ Pro la koncerna temo kaj programo.
Tio estis **dr. Radim Kalfus**. Li ja estadis en la malsanulejo en Lambaréné (en Gabono). Li skribis pri tio libron GRANDA DOKTORO.
Tio estis lasta vizito de R.K. en la simpozio. Jam en la j.1985 li mortís (pro kor-kolapso).
En la j.2006, kiam mi „trempis“ miajn piedojn en la malprofunda golfo de la riverego Zambezi, sur (super) la Viktoria-akvofaloj, mi konsciiĝis, ke ni estas en teritorio, kiu estas ligita kun la nomo David Livingstone. Kaj Emil Holub…
Vere – mi trairis negrandan fago-boskon kaj staris antaŭ malgranda trajnostacieto (similis al iu bohemia loka haltejo). Naivulo, mi „gapis“, ke en la arbustara regiono iras reloj (ne estis en la arbustara regiono, ili apudis la urbon Livingstone).
Eble tiuj ne estis el la tempo de E. H., sed – pli granda la surprizo: sur la muroj de tiu halto-stacidometo estis lokitaj fotografaĵoj de la Emil-Holub ekspedicio! Tio ne aspektis kiel oficiala ekspozicio… Tamen surprizo. Mi esperis la aferon ĝui en la muzeo de la urbo Livingstone, (sur kies katastro parkis nia buso). Sur la enirspaco mi ekvidis postamenton kun la busto de Emil Holub (ĝin prizorgis nia registaro). En la muzeo estis kompreneble multaj aĵoj koncernantaj Afrikon; sed ĉiuj estis NUR el la trovoj de David Livinstone, NENIU el la ekspedicio de Emil Holub! Neniu marko pri li! Tamen: ĉe la kaso unusola polvita foto – ĝuste de tiu skulptaĵo, kiu staras sur la korto. Do – mi ŝtelis ĝin…
Ĉar la fama E.H. ne bezonas popularigon, mi revenas al **dr. Radim Kalfus:**

(Enirvortoj de Ctibor Votrubec: Rememoroj pri Granda Doktoro A.S.)
„Aŭtoro de la rimarkebla libro – dr.Radim Kalfus – estis bona amiko de Albert Schweitzer, tial li kapablis pri li skribi tiel alloge. En la jaroj 1960–1966 li estis, kvarfoje, ĉe A.S. en Lambaréné.

Kune ni organizis la simpoziojn pri Alberto Schweitzer en Holice, kaj pri li ni parolis ankaŭ en radio-elsendejo.
Radim Kalfus naskiĝis en Liberec – Růžodol, en la jaro 1920. Lia patro tie estis direktoro de ĉeĥa mezlernejo. Poste la familio translokiĝis en Prago-n (Hanspaulka). En sia junaĝo estis Radim ravita de la libro „Homoj en praarbaro“ *(Lidé v pralese*) de A. S. Li studis en la jurisma fakultato de la Karolo-universitato, kie li estis tre aktiva delegito ĉe la entombigo de Jan Opletal. Por fuĝi el la atento de naziistoj, li devis sin kaŝi ekster Prago. Pro sia patriota braveco li estis alvokita esti pastoro de la Unuiĝo de Ĉeĥa Frataro *(Jednota Bratrská)*, en Ústí nad Orlicí. Li ŝatis muzikon kaj sian patrujon. Tial li en la regiono organizadis koncertojn de la Ĉeĥa filharmonio (dirig. Václav Talich), kiuj fariĝis manifestoj kontraŭ naziisma okupo de nia lando. Poste li translokiĝis en Liberec-on, kaj daŭre li laboris kiel pastoro.
De sia funkcio, delegito de la ministerio (edukado, kulturo), en la jaroj 1957–69, li faris 13 vojaĝojn en diversaj landoj (ekz. en la Betlehem-universitato, Usono, li ĉeestis malkovron de la busto de Komenio okaze de lia 400-naskiĝjariĝo), kiel delegito de la Ruĝa Kruco li flugis al Lambaréné (Ghano), kie li transdonis medikamentojn kaj san-bezonaĵojn (same, kiel en ĉiuj landoj en Afriko, Azio) kiel donacon de nia registaro. Albert Schweitzer akceptis lin tre sincere, ili fariĝis amikoj. Li invitis R.K. al sia 90-a naskiĝ-ceremonio en Lambaréné, kie li mem servis por la homaro 50 jarojn! Radim Kalfus proponis por la hospitalo la ĉeĥan doktoron Jaroslav Sedláček, kies kurac-servo estas plua merito de niaj samlandanoj en Afriko.“
Radim Kalfus pri Alberto Schweitzer:
„Li memorigis al mi, ke la profundan feliĉon mi povas senti nur en solidareco kun la vivo de aliaj homoj. Li memorigis al mi, ke ne sufiĉas la mondon priskribi, kompreni – sed precipe klopodi por la plibonigo.“
Filozofio, kiun Albert Schweitzer vivis, nomiĝas „Estimo al la Vivo“. En ties etiko li – kiel la unua famulo – elstaris kontraŭ la atom-armiloj kaj por plena senarmigo.
En la jaro 1952 li estis honorita per la Paco-Nobel-Premio.



## Praga klubo nove en Eventa servo !!!

Atentu! Niaj kunvenoj kaj aliaj aranĝoj estas nove en la paĝaro Eventa Servo: https://eventaservo.org/o/EO-Prago.
Vi trovos tie datojn, lokojn, priskribojn de la programoj kaj ankaŭ eventualajn ligilojn al interretaj aŭ hibridaj aranĝoj.
Jam longe estas en la Eventa Servo la brna klubo, kies paĝon ankaŭ indas sekvi: https://eventaservo.org/o/EO_Brno.

La retejon Eventa Servo kreis en 2017 Fernando Ŝajani. En lia urbo troviĝas malmultaj esperantistoj, tial maloftas la renkontiĝoj. Li certis, ke esperantistoj agas en aliaj urboj kaj landoj, sed kiujn eventojn ili organizas? Kie? Kiam? Li kreis Eventan Servon por ordigi tiajn informojn. En aprilo 2019 Fernando donacis la sistemon al Universala Esperanto-Asocio. UEA kaj TEJO ekde tiam instigas al la uzado de Eventa Servo por informi Esperantujon pri internaciaj, landaj kaj lokaj eventoj, kongresoj, kunvenoj, renkontiĝoj k.s. Fine de 2020 Eventa Servo iĝis la oficiala posteulo de la Kalendaro de Eventoj.hu. Ĉefa administranto de la Eventa Servo estas Yves Nevelsteen.

---

**Termíny a program schůzek od listopadu 2025:**

Termíny: 6. 11. / 20. 11. // 4. 12. / 18. 12.
Program: https://eventaservo.org/o/EO-Prago


**Klub esperantistů v Praze,**
pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

| | |
|---|---|
| Sídlo: | Jirečkova 5, Praha 7 – Holešovice, PSČ 170 00 |
| Web: | https://eventaservo.org/o/EO-Prago |
| E-mail: | praha@esperanto.cz |
| Facebook: | https://www.facebook.com/esperantoprago |
| YouTube: | Esperanto Prago |
| Schůzky: | Revoluční 5, Praha 1 – Nové Město, PSČ 110 00 |